

Travivu malvarmon!

—Realaj vintraj tagoj de hokajdanoj—

Vrkita de OKUMURA Juka

Antaŭparolo

Japana insularo estas ĉirkaŭ 3 000 kilometroj longa kaj la naturmedio varias multe laŭ la regiono. La plej norda gubernio, Hokajdo, apartenas al la subfresta zono, dume la plej suda, Okinavo, al la subtropika. Kiam hokajdanoj ankoraŭ vestas sin per mantelo, okinavanoj jam ĝuas naĝadon en la maro.



Mi naskiĝis kaj kreskis en la urbo Tojota en la gubernio Aiĉi. Fininte universitaton Nagoja, mi venis al la ĉefurbo de Hokajdo, Sapporo, por daŭre studi arbaran ekologion en magistriga kurso en universitato Hokajdo. Tio estis komenco de mia rilato kun Hokajdo.

De tiam pasis 30 jaroj.

Laŭ iu enketo, homoj, kiuj translokiĝis de sia naskiĝloko al iu alia loko, sentas averaĝe post 17 jaroj, ke tiu loko estas ilia nova hejmloko. Laŭ tiu teorio, ankaŭ mi jam estas hokajdano. Hodiaŭ mi, eksa aiĉi-ano, verku pri realoj de vintra vivo en Hokajdo, kiuj surprizis min aŭ al kiuj klopode mi alkutimiĝis.

Vintro en Hokajdo estas somero!?

Homoj loĝantaj en la ĉefinsulo de Japanio, Honŝuo, ofte diras, “Estas malvarmege en Hokajdo, ĉu ne?” Fakte estas malvarmege eksterdome. Sed endome estas, kontraŭ via supozo, pli varme ol en aliaj regionoj en Japanio. En publikaj ejoj, ekzemple, stacidomoj, bibliotekoj, hospitaloj, estas hejtataj sufiĉe varme aŭ eĉ tro. En Hokajdo oni ne bezonas vestiĝi multe sub mantelo. Kial ?



Foto 1 Hejtoleujo de la domo de aŭtoro (Fotis la aŭtoro.)

En la gubernio Aiĉi, kie mi kreskis, averaĝa temperaturo en januaro estas 4.8 celsiaj gradoj, kaj malofte neĝas. La malvarmeco ne estas tiel severa. Tial la loĝantoj ambaŭ eksterdome kaj endome multe vestas sin, kaj pasigas vintron nur per *kotacu* (tablo kun tablo-kovrilo kaj sube malgranda elektra varmigilo) kaj stovo foje hejtata. Lernoĉambroj de guberniaj altlernejoj de Aiĉi ne estis ekipitaj per stovo. La instruistoj klarigis la kialon, “Por kreskigi vian spiritan forton.” Aldone, en Honŝuo estas jenaj eventoj por tio, ekzemple, naĝado en vintra maro kaj karateo-trejnado en neĝo. Oni rigardas tian kapablon elteni malvarmon kiel iasenca virto.

Dume, ekzemple en Sapporo, en januaro averaĝa temperaturo estas minus 3.2 gradoj, kaj neĝas 29 tagojn el 31. En vasta Hokajdo troviĝas loko, kies plej malalta temperaturo fariĝas malpli ol minus 30 gradoj, kaj loko, kie neĝas entute pli ol 10 metrojn alte dum unu vintro.

Ekstere estas tiel froste, sed endome, tamen, tiel somere. Ĉiuj

domoj havas grandan hejtoleujon por 400 litroj (Foto 1), kaj la loĝantoj endome arde hejtas stovon. En la ĉambro 25-30 gradojn varma, ili trinkas frostan bieron kaj gustumas glaciaĵon, vestante sin nur per T-ĉemizo. Kiam ili enlitiĝas vespere, ili lasas stovon hejtata. Tio estas hokajda stilo. Vintro en Hokajdo estas tro severa kaj longa por pasigi per “mensa toleremo” kaj “solidanimo”. Inter hokajdanoj ne ekzistas ideo konsideri “havi spiritan forton kontraŭ malvarmo” kiel virto.

Ankaŭ bicikloj vintrodormas ...

Multaj el la legantoj ŝate uzas biciklon ĉiutage, mi supozas. Sur frosta vojo, nature, oni ne povas uzi ĝin. Do, dum ĉirkaŭ duonjaro necesas aliaj veturrimedoj.

Lernantoj de elementa kaj meza lernejoj piedirante flekventas sian lernejon, aŭ en provinco veturas per municipa porlernanta aŭtobuso. Sed altlernejoj, kiuj devas viziti foran lernejon, enfalas en malfacilon.

Vintre altlernejoj piediras uzante duoble aŭ pli multe da tempo ol en somero. Lernantoj, kiuj uzas trajnon, uzas taksion kune kun siaj amikoj inter la plej proksima stacio kaj la lernejo. En vera provinco patr(in)o veturigas la lernanton per sia aŭto.

Ju pli bicikloj estas utilaj, des pli da malfacio la lernantoj havas.

Sledo ne estas ludilo.

Butikumi ĉiutagaĵojn estas peniga en vintro. Oni ne povas uzi biciklon. Multaj senaŭtuloj veturas per taksion, sed la veturpago malpezigas monujon. En Hokajdo troviĝas provincoj, kie ne funkcias taksio efektive. Piediri al vendejo kaj reveni hejmen kun

pezaj aĉetaĵoj estas malfacile. Kion fari?

Plasta sledo bone laboras. Fojfoje apud supervendejo mi vidas gemaljunulojn, kiuj tiras sledon plenan de aĉetaĵoj. Iuj tiras ne nur aĉetaĵojn sed ankaŭ sian nep(in)on (Foto 2). Sledoj povas anstataŭi beboĉareto. Mi estis multe surprizita vidinte tion unuafoje.

Ankaŭ mi, tamen, tuj fariĝis “sledujo” . En miaj studentaj tagoj en Sapporo, mi vizitis benzinstacion por aĉeti hejtoleon, tirante



Foto 2 Aĉetaĵoj kaj infano sur sledo (El interreto)

sledon kun oleuoj por 18 litroj. Sledoj estas utilaj por porti pezajon.

Vivmorte veturigi aŭton ...!

En grandaj urboj, en Tokio k.c., facile troveblas tiuj, kiuj ne havas aŭton aŭ aŭtistan licencon. En Hokajdo tiaj homoj estas malmultaj. Krom ene de Sapporo, publikaj transportoj estas tro maloportunaj kiel ĉiutagaj veturrimedoj.

En aŭtstirado-lernejoj, instruistoj emfazas, “Veturigi aŭton vintre egalas al grimpi monton vintre”. Oni devas ekipi sian aŭton per kontraŭfrostaj vestoj, uzita lankovrilo, ŝovelilo, poŝvarmigiloj kaj rezervaj manĝaĵoj.

Eĉ se oni gardas sin tiele kontraŭ “vintra montgrimpado”, tio ne estas sufiĉa. Vastaj kampoj kaj paŝtejoj, tra kiuj somere oni pasas agrable, ŝanĝiĝas



Foto 3 Vojmontrilo *jabane* (sago) (Fotis la aŭtoro.)

al danĝeraj lokoj pro neĝstormo. En neĝblovado, ne povante vidi

bone, ni dependas de ruĝe-blanke koloritaj vojmontriloj nomataj *jabane* (sagoj), kiuj indikas vojrandon (Fotoj 3, 4). Kiam eĉ ili ne estas videblaj, ni devas uzi nian “sesan senton”. Tio ne estas ŝerco sed realo.



Foto 4 Vico de *jabane* sciigas kurbiĝon. En neĝblovado tio estas fidinda. (Fotis la aŭtoro.)

Muskolo kreskas en vintro.

Vintre oni emas resti endome. Eĉ se vi ŝatas trotadon aŭ promenadon, vi vintre fariĝas maldiligentaj, mi supozas. Sed por hokajdanoj vintro estas sezono por akumuli fizikan forton, ĉar ili havas laboron, nome, neĝforigo.

Neĝon sur publikaj vojoj forigas neĝplugmaŝinoj de la urbo aŭ vilaĝo (Foto 5). De la pordo ĝis la vojo oni mem devas forigi neĝon. Oni devas elfosi sian aŭton metitan sub la ĉielo. Por forigi neĝon, oni uzas ŝovelilon, sed de tempo al tempo oni bezonas pioĉon por forigi neĝajn blokojn, kiuj restigas la neĝplugmaŝino. Tiamaniere antaŭ sia propra laboro oni plene laciĝas.



Foto 5 Municipa neĝplugmaŝino (El interreto)

Hejma neĝforigmaŝineto estas utila (Foto 6). Sed nur sur pavimo ĝi glate iras. Por funkciigi ĝin sur malebenaj teroj kaj eĉ por rekte irigi ĝin, ni devas klopodi tutforte.



Foto 6 Neĝforigado per hejma maŝineto. Necesas pli da forto ol rigardo. (El interreto)

Pro tiaj kialoj, vintre ni ne povas eviti muskolan doloron. Ĝi signifas, ke la muskoloj kreskas dikaj. Tial povas esti, ke neĝforigo estas “bonvena” vintra sporto. Antaŭ alveno de printempo, ĉiuj hokajdanoj fariĝas muskolaj.

Postparolo

Mi emfazis malfacilojn en vintra Hokajdo. Sed mi pensas, ke norda lando estas plej bela en vintro. Mi esperas, ke vi, la legantoj, nepre vizitu Hokajdo vintre. (fino)